SVISA ESPERANTO - SOCIETO

INFORMAS

N-ro 2/1996 MARTO-APRILO

## ĜENERALA KUNVENO DE SES 1996

ĝi okazos la 23-an de marto, ekde 09.30h, en la unuaklasa Bufedo de la fervoja stacidomo en **Neuchâtel.**
(Atentu! La unua indiko HOTELO TERMINUS, skribita en SES INFORMAS 1/1996, ne plu validas).
La kunveno daŭros proksimume ĝis 13.00h.
Poste ni kune tagmanĝos en la restoracio, (du pladoj, deserto, kafo) kontraŭ CHF 25.-
La tagordon kaj la raportojn de la prezidantino vi trovas en SES INFORMAS 1/1996, sur paĝoj 2-5.

La datlimo por la aliĝo estas la 15-a de marto 1996.

La kunorganizanto, KULTURA CENTRO ESPERANTISTA afable invitas al la KULTURA MONATFINO: (Rigardu la apartan Programon.

La estraro tre ĝojus, se li povus bonvenigi multajn gesamideanojn.

Do, ĝis revido en NEUCHÂTEL, la 23-an de marto.

ooOoo

# A L I Ĝ I L O

**AL LA ĜENERALA KUNVENO DE SES ***

**AL LA KULTURA MONATFINO*** aŭ **LINGVOKURSO POR PROGRESANTOJ*, ĈE LA DOMPARO**

Mi aliĝas al la suba(j) aranĝo(j), kaj mi sendas la jenan aliĝilon **plej malfrue** ĝis la 15a de marto.

Nomo:....................antaŭnomo:..................

Adreso:.........................................

poŝtkodo:........Urbo:..........................

| | |
|---|---|
| Mi mendas vegetaran* tagmanĝon* sabate en la unuaklasa bufedo de la fervoja stacidomo en Neuchâtel | CHF 25.- |
| kaj mi samtempe ĝiras anticipe | CHF 15.- |
| - aliĝas al la KULTURA MONATFINO en KCE, laŭ aparta programo | CHF 60.- |
| - mendas liton 1* 2*lita ĉambro | CHF .... |
| - mi apogas la agadon de KCE/SES* per donaco | CHF .... |
| **ENTUTE:** | CHF .... |

La sumon mi samtempe ĝiras al la poŝta ĉekkonto de KCE 23-2921-8, La Chaux-de-Fonds.

Mi konsentas, ke KCE konfirmas mian aliĝon, nur se ĝi alvenas al la adreso de KCE ĝis la 15a de marto kaj kaze de nuligo ene de dek tagoj mi ne ricevas la pagitan anticipon.

Dato:..............subskribo:...................

*Bonvolu forstreki la nevalidan.

# Ĝenerala Kunveno de SES en Neŭŝatelo, 1996 03 23: proponitaj statutmodifoj

Laŭ la decidoj de la ĝenerala Kunveno 1995, kaj posta konsultiĝo ene de la Centra Komitato, la membraro de SES estas vokita esprimi sin pri kelkaj statutmodifoj.

Vi trovas ĉi-sube la koncernajn artikolojn: normale, estas la nun valida teksto; *kursive, estas la proponita.*

Kompreneble, la artikoloj ne menciitaj restos senŝanĝaj.

**Propono 1**: *Laŭ principa aprobo de la ĝenerala Kunveno 1995, la CK kunfandiĝas kun la Estraro, sub nomo "Estraro". Tial ĉie, kie en la Statuto aperas unu aŭ alia nomo, oni aŭtomate legu "Estraro".*

***Propono 2**: La unua ĝenerala propono de la Estraro estas anstataŭigi la difinon "ĝenerala Kunveno" per la pli simpla "Asembleo". Se tiu ĉi propono estos akceptita, ĉie en la Statuto, kie aperas la difino ĜK oni legu "Asembleo" sen bezono aparte aprobi la diversajn alineojn.*

**Art. 1 - Nomo**

(...)

itale: Società Svizzera di Esperanto

(...)

*itale: Società Esperantista Svizzera.*

**Art. 3 - Celoj**

Disvastigi en Svislando la lingvon Esperanto, kaj kulturi ĝin en ĉiuj manieroj.

Kunlabori aŭ rilati kun aliaj esperanto-organizaĵoj.

*Disvastigi en Svislando la lingvon Esperanto kaj ĝian kulturon.*

*Tiucele subteni iniciatojn, ankaŭ de aliaj esperanto-organizaĵoj svisaj, por informado kaj publikaj rilatoj favore al esperanto.*

**Art. 4 - Sidejo**

La jura sidejo de Svisa Esperanto-Societo estas ĉe la loĝloko de la prezidanto aŭ en alia loko laŭ decido de la CK.

*La jura sidejo de Svisa Esperanto-Societo estas ĉe ĝia oficiala arkivejo, nome la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds, fako CDELI.*

*La organiza adreso estas ĉe la Prezidanto aŭ alia persono, indikita de la Estraro. La Estraro rajtas fiksi pliajn adresojn je kantona nivelo, pro informaj, publikrilataj aŭ fiskaj kaŭzoj.*

**Art. 7. Konsisto**

La membraro de Svisa Esperanto-Societo konsistas el:

a) Membroj individuaj (...)

b) Membroj juraj (...)

c) Membroj kolektivaj: Jura membro havas la eblon igi siajn anojn kolektivaj membroj de Svisa Esperanto-Societo, abonigante ilin al la informilo de SES. Tiuj ĉi abonantoj estas listigitaj kiel kolektivaj membroj de SES kun voĉdonrajto en la Ĝenerala Kunveno.

d) Dumvivaj membroj.

e) Honoraj membroj (...)

*Forigi la tutan paragrafon c) kaj la mencion pri kolektiva membreco en la paragrafo b).*

**Art. 8 - Kotizoj**

(...)

ĉ) Por esti dumviva membro oni devas unufoje pagi la 20-oblon de la baza kotizo.

*Aldoni: Por emeritoj temas pri la 20-oblo de ilia reduktita baza kotizo.*

**Art. 9 - Voĉdonrajto**

(...) *Ĉiu membro havas unu voĉon. Oni ne akceptas delegojn.*

**Art. 12 - Organoj**

a) La Ĝenerala Kunveno.

b) La Federa Konsilio.

c) La Centra Komitato.

ĉ) La Estraro.

d) Kaskontrolantoj.

e) La Konflikto-Komisiono.

*a) La Asembleo.*

*b) La Estraro*

*c) La Kaskontrolantoj.*

*d) La Konflikto-Komisiono.*

**Art. 14 - Ĝenerala Kunveno / *Asembleo***

(...) tio signifas, ke la kunveno disvolviĝos laŭ la ĉi-sekva minimuma tagordo:

b) Raporto de la Centra Komitato.

c) Financa raporto. (...)

d) Raporto de la komisionoj.

e) Elektoj de prezidanto, de tri pliaj komitatanoj, de kaskontrolantoj, de la membroj de la Konflikto-Komisiono, ktp. (La mandatoj por ĉiuj funkcioj daŭras tri jarojn).

Noto: (...) organo de Svisa E-Societo

*(...) tiam validas la sekvaj punktoj:*

*b) Morala raporto de la Estraro.*

*c) Administra raporto de la Estraro. (...)*

*d) Raporto de eventualaj komisionoj.*

*e) Elektoj (laŭ la ĉeso de la mandatoj, kiuj normale daŭras 3 jarojn).*

*Noto: (...) informilo de Svisa E-Societo.*

**Art. 15. Eksterordinara ĝenerala Kunveno kaj skriba voĉdono**

(...) sendita al la ĝenerala sekretario.

*(forigi la suprajn vortojn)*

**Art. 16. Federa Konsilio**

*forigi la tutan artikolon*

**Art. 17 - Estraro kaj Centra Komitato / *Art. 16 - Estraro***

La Estraro kaj la Centra Komitato estas la plenuma instanco de Svisa Esperanto-Societo. La Estraro konsistas el minimume 3 elektitoj fare de la Ĝenerala Kunveno. La Estraro rajtas alelekti pliajn membrojn. Ĉiuj kune formas la Centran Komitaton.

*La Estraro estas la plenuma instanco de Svisa Esperanto-Societo. Ĝi konsistas el minimume kvin (maksimume sep) elektitoj fare de la Asembleo. Inter ili estas prezidanto (kies voĉo estas decida en kazo de egaleco), vicprezidanto, sekretario kaj kasisto. La tri lingvoregionoj de Svislando devas esti reprezentitaj en la Estraro.*

***(Nova) Art. 17 - Kaskontrolantoj***

*La Kaskontrolantoj plenumas la taskon kontroli, konsili kaj helpi pri la librotenado, kaj raporti pri ĝi al la Asembleo. Ili estas minimume du, plus eventualaj anstataŭantoj.*

**Art. 19 - Proponoj**
(...)
b) Por esti publikigebla en Svisa Esperanto-Revuo (...)
*b) Por esti publikigebla en la oficiala informilo (...)*

**Art. 22 - Membriĝo**
Membriĝon, kiu efektiviĝas per pago de la kotizo, registras la CK. Skriba kunlabor-kontrakto konfirmas la membriĝon de la membroj kolektivaj. La CK rajtas rifuzi membriĝon. La rifuzito rajtas submeti sian membriĝan kandidatiĝon al la Konflikto-Komisiono.
*Membriĝo efektiviĝas per kotizpago. La Estraro rajtas rifuzi membriĝon. La rifuzito rajtas apelacii ĉe la Asembleo.*

**Art. 24 - Landa Asocio de UEA / *Rilatoj kun UEA***
Svisa Esperanto-Societo estas landa asocio de Universala Esperanto-Asocio (UEA). La membroj individuaj, juraj kaj kolektivaj de SES, kiuj ne deziras esti registritaj kiel aligitaj membroj de UEA, povas efektivigi tiun deziron per skriba peto al la ĝenerala sekretario de SES.
.... *(aldone) La individuaj membroj de UEA rajtas je kvinprocenta rabato sur sia baza kotizo.*

---

**12-a**

**PRINTEMPA SEMAJNO INTERNACIA**

**KAJ**

**2-a PRINTEMPA LERNEJO INTERNACIA**

**1-8 aprilo 1996 en D U D E R S T A D T**

Harc-Montaro, Germanio

(Detala programo kaj aliĝilo estas riceveblaj ĉe la redakcio de SES INFORMAS. Bonvolu aldoni al vi afrankitan koverton. Dankon)

ooOoo

# P R O G R A M O

## DE LA KULTURA MONATFINO EN KCE

Georgio Silfer proponas prelegaron kaj dialogojn,

**foliumante cent jarojn de Esperanto+teatro,**

aŭ vi povas aliĝi al LINGVOKURSO POR PROGRESANTOJ:

Sabaton ni havos kune vespermanĝon kaj postan babiladon ĉirkaŭ la kameno de la salono. Eblas tranokti en la DOMPARO, aŭ en Junulgastejo/hotelo, proksime de KCE.

**KUNVENEJO: CE LA DOMPARO,** ch. des postiers 27, 2301 La Chaux-de-Fonds.

**Trajno** el Neuchâtel al La Chaux-de-Fonds, sabate je 15.08h.

**PREZOJ:** KULTURA MONATFINO kun programo kaj

| | |
|---|---|
| vespermanĝo | CHF 60.- |
| Matenmanĝo dimanĉe | CHF 15.- |
| Unulita ĉambro | CHF 8.- |
| 1 lito en dulita (geedza) ĉambro | CHF 40.- |
| 1 lito en dulita kaj kvarlita (etaĝa) ĉambro | CHF 30.- |
| ENTUTE: | CHF ..... |

**Ni ankaŭ kalkulas je via ĉeesto!** Kun la espero de agrabla, komuna semajnfino ni antaŭdankas por via aliĝo kaj kontribuo por KCE kaj SES.

ooOoo

## M O R T - A N O N C O:

La 22-an de januaro 1996 mortis Anna-Bertha Gerber, 81-jara. Inter la esperantistoj ŝi estis bone konata persono, kiel ankaŭ internacie pro la multaj kongresoj, kiujn ŝi vizitis. Al la funebra familio ni esprimas sinceran kondolencon.

SVISA ESPERANTO-SOCIETO

ooOoo

# BILANCO de SES 1995

| JARKALKULO | BUĜETO 95 | KALKULO 95 | BUĜETO 96 |
|---|---|---|---|
| Membrokotizoj | 8'560.- | 7'770.- | 8'500.- |
| Abonoj (sen membreco) | 610.- | 490.- | 600.- |
| Donacoj | 1'000.- | 420.- | 1'000.- |
| Donacoj Agado 2003 | 1'900.- | 2'310.- | 2'400.- |
| Interezoj SKA (sen GEP) malnetaj | 2'100.- | 516.05 | 1'900.- |
| Enspeza sumo | 14'170.- | 11'506.05 | 14'400.- |
| INFORMADO, PUBLIKAJ RILATOJ | | | |
| Informado, varbado | 4'500.- | 1'973.35 | 3'000.- |
| Omaĝoj kaj laborrimedoj | 50.- | 40.- | 50.- |
| Argus | 1'200.- | 1'466.95 | 1'500.- |
| Subvencioj | 1'000.- | 800.- | 1'000.- |
| Agado 2003 | 1'000.- | 1'000.- | 1'000.- |
| | 7'750.- | 5'280.30 | 6'550.- |
| SERVOJ | | | |
| Literatura Foiro | 5'450.- | 5'448.- | 5'450.- |
| SES Informas | 2'000.- | 1'098.10 | 2'000.- |
| Kunvenoj | 450.- | 0.00 | 450.- |
| | 7'900.- | 6'546.10 | 7'900.- |
| ADMINISTRADO | | | |
| UEA-kotizoj | 220.- | 151.- | 200.- |
| Administraj kostoj | 1'000.- | 1'385.95 | 1'000.- |
| Bankelspezoj kaj diversaj | 300.- | 227.70 | 250.- |
| | 1'520.- | 1'764.65 | 1'450.- |
| Elspeza sumo | 17'170.- | 13'591.05 | 15'900.- |
| Gajno/Perdo | -3'000.- | -2'085.- | -1'500.- |



| Kapitalo (SKA+GEP+CE) | | AKTIVOJ | PASIVOJ |
|---|---|---|---|
| GEP, konto 079 (sen interezoj) | | 30'041.10 | |
| Inventaro | | 1.- | |
| SKA kuranta konto | | 25'630.90 | |
| SKA fonduso Agado 2003 | | 3'811.70 | |
| Varbsumo disponebla ĉe Gacond | | 1'500.- | |
| SKA (sen GEP) antic. impostoj, bonhavo ĉe ESV | | 180.65 | |
| Transaj eroj aktivaj kaj pasivaj | | | 305.- |
| Kapitalo je 95-01-01 | 61'445.35 | | |
| minus Perdo | - 2'085.- | | |
| plus varbsumo ĉe Gacond | + 1'500.- | | |
| Kapitalo je 95-12-31 | 60'860.35 | | 60'860.35 |
| | | 61'165.35 | 61'165.35 |



| Rezerva kapitalo (SVB) | | | |
|---|---|---|---|
| SVB Ŝparkonto | | 12'558.95 | |
| SVB antic. impostoj, bonhavo ĉe ESV | | 129.60 | |
| Rezerva kapitalo je 95-01-01 | 12'318.30 | | |
| plus interezoj malnetaj | + 370.25 | | |
| Rezerva kapitalo je 95-12-31 | 12'688.55 | | 12'688.55 |
| | | 12'688.55 | 12'688.55 |

95-12-31

Ernst von May, kasisto

**SVISA ESPERANTO-SOCIETO (SES) Revizora raporto 1995**

La subskribintoj,
Margrit Guldin, Murtenstrasse 1, 3008 Bern kaj
Ernst Glättli, Laurstrasse 17, 5200 Brugg,

kunsidis la 30-an de januaro 1996 en la domicilo de la SES-kasisto, sinjoro Ernst von May en Oberuzwil, por revizii la librotenadon de Svisa Esperanto-Societo (SES).

Dum la revizio ni certigis nin, ke

- la transskribo de la saldoj el la pasintjara kontofolioj korekte okazis,
- la enskribo de en- kaj elspezoj efektiviĝis surbaze de ekzistantaj pruviloj (la revizoroj limiĝis je multnombraj divenprovaj kontroloj),
- la sumo en la bilanco akordas kun la kontosaldoj,
- la bankkonto-eltiroj estas je dispono kaj dokumentas la efektivan ekziston de la asocia havaĵo.

La skriba konfirmo de la jarfina saldo de la konto "079 GEP" (Gastejo Edm. Privat) ne ankoraŭ atingis la kasiston. Ankaŭ mankis je la tago de la librotenado-revizio la ĝiro de la interezo por 1995.
La kasisto, Ernst von May, ĝustatempe postulis la transpagon. Li ne perdos la aferon el la okuloj.

La jarkalkulo 1995 de SES montras enspezojn de Fr 11'506.05 kaj elspezojn de Fr.13'591.05. El tio rezultas perdon de Fr.2'085.-. La budĝeto antaŭvidis perdon de Fr.3'000.-. Se la interezo de GEP estus ĝustatempe atingita la kasiston, tiam la jarkalkulo 1995 de SES estus montrinta eĉ pli bonan bilancon.

La havaĵo de SES (kapitalo kaj rezerva kapitalo) malpliiĝis je Fr.214.75 kaj atingis la 31an de decembro 1995 ankoraŭ Fr.73'548.90.
La revizoroj povis konstati,ke la librotenado estas tre zorgeme farita kaj la kontoj/pruviloj bonege ordigitaj. Tial ili proponas al la ĝenerala kunveno aprobi la jarkalkulon 1995,malŝarĝi la CK kaj esprimi per forta aplaŭdo la dankon al nia fidela kasisto,pro la altruisme plenumita tasko dum la jaro.
Bern kaj Brugg, la 31.1.1996. La kaskontrolantoj:

M. Guldin E. Glättli

## G R U P A J   I N F O R M O J

**ESPERANTO-SOCIETO BASEL:**
En Altersheim Neubad
28.3.20.00h Monata Kunveno: Nicole Béroud-Focke prelegos kun lumbildoj pri montaraj ferioj en Svislando.
25.4.20.00h Monata kunveno: Gasto?

**BELLINZONA:**
Ni kunvenas ĉiam la 2-an sabaton en Viale Motta 32, 6500 Bellinzona.
9.3.17.00h kaj 14.4.17.00h

**ESPERANTO-SOCIETO BERN:**
En restoracio AL FORNO Spitalgasse 37.
5.3.19.30h kaj 2.4.19.30h

**ESPERANTORONDO BIELO:**
En restoracio MIGROS, Neumarkt, Bielo 3
ĉiun ĵaŭdon 18.00-19.00h

**ESPERANTO-SOCIETO "LA STELO" GENÈVE:**
En INSTUTUT NATIONAL GENEVOIS, Promenade du Pin 1, subteretaĝo, Haltejo Athénée Busoj 3+5.
8.3.19.00h Monata Kunveno (Jarkunveno)
19.4.19.00h Monata Kunveno

**ESPERANTO-SOCIETO LAUSANNE:**
4.3.19.00h Monata Kunveno: okazos prelego.
ĉiun duan lundon en la monato la Esperanto-konversaci-emuloj povas sin renkonti ĉe Yvette Goy, quai de l'indépendance 6, en Cully. Tel: 021/799 19 36.

**LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO/LES:**
En restoracio EMMENBAUM, Gerliswilstr.8 en Emmenbrücke
1.3.20.00h ĜENERALA KUNVENO de LES
13.3.14.00h kaj 12.4.14.00-16.00h paroliga kunveno. Gvido Franz Brügger
25.4.19.30h paroliga kunveno.Gvido F.Brügger
20.00h Babilado

25.4.20.20h Interŝanĝo de informoj
20.45h LITERATURA VESPERO (ĉerpaĵoj el la "NOVA ESPERANTA KRESTOMATIO: Parolos Sonja Brun.

**ESPERANTO-SOCIETO NEUCHÂTEL:**
Ni kunvenas ĉiumonate iun vendredon, laŭ ebleco de la membroj.

**ESPERANTOKLUBO WIL:**
En restoracio Schweizerhof, untere Bahnhofstrasse 18.
13.3.20.00h Monata Kunveno (prelego)
10.4.20.00h Monata Kunveno (Literaturo)

**ESPERANTO-SOCIETO ZUERICH:**
En la propra kunvenejo, en Eisengasse 22, subteretaĝo, kie okazas ĉiuj renkontiĝoj.
11.3.19.15h Monata Kunveno
25.3.19.15h Libera Kunveno
15.4.19.15h Monata Kunveno (la kutime 2-a lundo estos paska lundo. Tial la aprila MK okazos je la 15.4.)
29.4.19.15h Libera Kunveno

oo0oo

## G R A V A K O L O K V O

En la **UNIVERSITATO DE NEUCHÂTEL** okazos, la **7-an kaj 8-an de marto 1996**, grava kolokvo. S-ro Claude Piron kaj s-ino Lily Papaloizos prelegos pri Esperanto kaj s-ino Mireilles Grosjean prelegos pri klaso-interŝanĝoj.
La kongreso estas tre altnivela kaj meritas la atenton de la publiko.

oo0oo

La 15-a Internacia Literatura Forumo

pri **TEATRO EN ESPERANTO**

1996 julio 05-10. Sabatejo/Szombathely-Hungario

P R O G R A M O (provizora)

| | | | |
|---|---|---|---|
| 05.07. vendrede | - ekde tagmezo: | akceptejo, libroservo |
| | posttagmeze : | libertempo |
| | vespere : | interkona vespero<br>distra vespero |
| 06.07. sabate | - antaŭtagmeze: | inaŭguro de la forumo;<br>fakaj prelegoj |
| | posttagmeze : | inaŭguro de la ekspo-<br>zicio pri teatra spek-<br>taklo |
| | vespere : | teatra spektaklo |
| 07.07. dimanĉe | - antaŭtagmeze: | fakaj prelegoj |
| | posttagmeze : | teatraĵo aŭ filmo |
| | vespere : | teatra spektaklo |
| 08.07. lunde | - duontaga ekskurso kun programo kaj tagmanĝo aŭ vespermanĝo (pagota a-parte). Komuna programo aŭ distraĵo | |
| 09.07. marde | - antaŭtagmeze: | faka prelego, ronda tablo |
| 10.07. merkrede | - unutaga ekskurso (pagota aparte) | |

**TRANOKTEBLO**

A. En dulitaj/kvarlitaj ĉambroj(duŝejo + necesejo en-ĉambre) kun abunda matenmanĝo. Por 4 noktoj (05/07,7-08/09.07) kostas 45.- CHF. (Por pliaj noktoj sen ma-tenmanĝo: 12.- CHF/nokto/persono)

B. En tristela hotelo kostas ĉ, 90.- CHF/nokto/persono + 5.- CHF neredonebla sumo por la mendo. Eblas nuligi la rezervon ĝis la 20-a de junio 1996.

**MANĜEBLOJ**

A- En la studenthejmo nur inter la 5a kaj la 9a de julio (kaze de pli ol 70 mendoj) tagmanĝo + vespermanĝo/per-sono/tago ĉ, 8.- CHF.

B. En restoracioj ĝenerale por 8-15.-CHF/manĝo.

| **ALIĜKOTIZOJ** en svisaj frankoj | ĝis 31.3. | 30.6. | poste |
|---|---|---|---|
| por *landoj kaj membroj de LF-kop | 10.- | 40.- | 60.- |
| por alilandanoj | 30.- | 50.- | 60.- |

La duontaga ekskurso kun manĝo la 7an de julio kostas ĉ. 10-CHF (pagota surloke), neredonebla antaŭpago 1-CHF. La tuttaga ekskurso la 10an de julio kostas ĉ. 20-CHF.

*el ekssocialismaj landoj de Eŭropo kaj Azio,Kubo, sud-Ameriko.

**SPECIALAJ RABATOJ POR GRUPOJ** (ĝis 31a de marto 1996.

2 - 6 grupanoj: 27.- CHF/persono
7 - 20 grupanoj: 24.- CHF/persono
pli ol 20 grupanoj: 20.- CHF/persono

La neredoneblaj anticipoj por grupanoj:

| | |
|---|---|
| por la tranoktoj | 10.- CHF/persono |
| por la manĝoj (5 tagoj) | 8.- CHF/persono |
| por la duontaga ekskurso | 2.5- CHF/persono |

(por grupoj ni rezervas tranokton nur en la student-hejmo kun tag- kaj vespermanĝo

Datumoj de la subskribinto
Nomo: S-ro/s-ino ............Antaŭnomo .............
Lando:...............; urbo(kun poŝta kodo...........

Adreso:..........................................

Kolektis grupo el lando: ............................

La grupo konsistas el: ..... personoj personoj por la 15a ILF.
La grupo loĝos en la studenthejmo inter la 05/06.07 kaj petas ankaŭ vespermanĝon dum tiuj tagoj en la stu-denthejmo.

Samtempe mi pagas la aliĝkotizon ....x....entute ........CHF
la anticipojn por la manĝoj ....x....entute ...CHF
por tranoktoj ....x....entute ........CHF
por la duontaga ekskurso: ....x....entute......CHF
pagita entute......CHF

La nomojn kaj adresojn de la partoprenantoj mi sendos al vi  gis la 25a de aprilo. Ni petas vin sendi ĉiujn informojn al mia supra adreso.

Dato:...............    Subskribo..................

## ALIĜILO

Mi aliĝas al la 15a Internacia Literatura Forumo

Nomo:S-ro/S-ino.............Antaŭnomo.............

Lando:................urbo(poŝta kodo..............

Adreso:........................................

kaj samtempe pagas aliĝkotizon ................ CHF

mendas ĉambron inter la....a kaj la....a por...noktoj en (*studenthejmo/hotelo kaj pagas anticipon.....CHF
mendas manĝon(*vegetaran/en la studenthejmo por la tagoj inter la 05.07 (ekde tagmanĝo) ĝis la 09.07. (ĝis tagmanĝo) kaj pagas anticipon ......CHF
Mi partoprenas la duontagan ekskurson kaj pagas anticipon .....1.- CHF entute ........CHF.
La sumon mi samtempe pagas al LF-Koop,pĉk.12-11114-5 Prilly, Svislando, al la loka agento  de LF-Koop(nur el Bulgario, ĉeĥio, Hungario, Ruslando, Slovakio, Slovenio.
Via aliĝo validas nur  ekde la alveno de pagoj!

Mi deziras partopreni(*jes/ne) la unuatagan ekskurson 10.07. kaj petas detalan programon.
Mi petas informojn (*jes/ne) pri la veturebloj al Szombathely (*bonvolu substreki la konvenan).

Dato..........    Subskribo..............

La aliĝilon bonvolu sendi al:Literaturo Foiro, CP.779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, aŭ Esperanta PEN-Centro, H-1580 Budapest, Pf.117 Hungario.

Detalan programon pri la teatraĵoj kaj ekskursoj  ni sendos al la aliĝintoj (kaj al interesiĝantoj kontraŭ respondkupono) post la 20a de aprilo 1996.

PP
8053 Zürich

**DONACOJ AL SES KAJ AGADO 1003**

Inter aŭgusto kaj dezembro 1995 SES ricevis la jenajn donacojn:

**POR SES:** (konto 33)
D. Bühlmann 40.- J.T. von Büren 30.-

**POR AGADO 2002:** (konto 34)
F. Badoux 50.- T. Carlevaro 50.- D.Bühlmann 100.- Hans Bickel 20.- R. Heer 200.- W.Laederach 10.- M. Sormani 15.- A. Veith 20.- D. Bertolini 50.- P. Rüegg 100.- A.Baur 20.- L. Schaerer 50.- M. Moreillon 25.- A.Koller 50.- J.J. Lavanchy 100.- C. Gacond 150.- A. Wenger 50.- M. Lüthi 15.- D. Rooke 50.- V. Chaves 25.-

SES tutkore dankas al ĉiuj donacint(in)oj por la valoraj kontribuoj. -La kasisto-

oo0oo

**Limdato por kontribuaĵoj al SES INFORMAS 3/96 estas la 6-a de aprilo 1996.**

**Red-Adreso: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich. Tel: 01/381 77 13**